

Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

TIEL OKAZIS

UNU-TAGA KURSO

*la 13-a de aprilo, 16h15-17h45, ĉambro 603

Al unu interesito, ni havis enkondukon de Esperanto. Ŝi jam vizitis nin marte okaze de la Foiro de civitanaj rondoj.

HAMA-RONDA VESPERO

*la 20-a de aprilo, 17h30-19h00, ĉambro 404

Nia Hama-Rondo (Jokohama Esperanto-Rondo) fariĝis 45-jaraĝa kaj en tiu ĉi tago, s-ro DOI Hirokaz revuis la historion de la rondo ekde la fondiĝo. Estis 16 partoprenantoj.

NIAJ PLANOJ

HAMA-RONDAJ VESPEROJ

*la 18-a de majo, 17h00-19h00, ĉambro 604

Ni gastigos ges-rojn Kleemann el Germanio. S-ino Kleemann estas japano edziniĝinta per Esperanto al germano. Ili renkontiĝis en Japanio en 1965. S-ro Kleemann havis kuracistan vivon, el kiu li jam emeritiĝis. Pri ilia vivo ni aŭskultos interesajn epizodojn.

*la 15-a de junio, 17h00-19h00, ĉambro 601

Ni gastigos s-inon SUZUKI Masumi. Ŝi, rulseĝa vivanto, faris dufojajn mondovojaĝojn sur t.n. Pacboato, kun sia edzo. Ŝi tie gvidis Esperanton aŭ Esperantajn kantojn.

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Rudimenta kurso: Komencita de la 20-a de aprilo, kun la supre menciita partopreninto en la Unu-taga kurso.

*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

*Regula Klaso en merkredo por legado de "Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj".

Muziko en la baldaŭa Kongreso en Kantoo

En la 18a kaj la 19a de majo, okazos la 62a Esperanto-Kongreso en la Regiono Kantoo, en la urbo Tomioka de la Gubernio Gunma. Inter ĝiaj programeroj, 2 muzikaĵoj estas de la membroj de Jokohama Esperanto-Rondo.

(1) "Ni kune kantu Esperantajn kantojn": la korusanoj de nia rondo kantos gvidate de s-ro Makino Micuo. Planataj estas jenaj kantoj: "Kanto de abel-infanar", "Floro de orkid" kaj "Rekviemo", plus "La Espero" japanlingvigita.

(2) "Koncerto de Mandolino", fare de ges-roj lŭaja Micuru kaj lŭaja Mijuki.



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

ESEJOJ

Parolas iama lernanto de Julio Baghy

HIROSE Kanae

En 1997, mi partoprenis en La 82-a Universala Kongreso(UK) de Esperanto en Adelajdo, Aŭstralio. Lun tagon mi sola manĝis malfruan lunĉon en la salono apud la kongresejo. Tie oni povas trinki, manĝi, interparoli en amika etoso. Mi metis sur la tablon sandviĉon kaj kafon, ankaŭ la libron “Sur sanga tero”, kiun mi ĵus aĉetis en la libroservo. Tiutempe mi havis la libron “Viktimoj”, sed ne “Sur sanga tero”.

Antaŭe mi legis la verkojn de Julio Baghy en la Literatura Mondo(LM), represita en Tokio. Foliumante LM-n, mi trovis la unuan parton de la romano “Viktimoj”, en la januara numero de 1925. Mi tre interesiĝis kaj poste en ĉiu numero mi legis la daŭrigon.



En la kongreseja salono mezaĝa viro, kiu portas kafon kaj sandviĉon sur pleto, sidiĝis apud mi kaj afable salutis min.

“Mi estas hungaro, loĝanta en Svisio.”

Li tuj okulis al la libro surtabla kaj diris.

“Julio Baghy estis mia instruisto.”

“Ĉu vere?” momente mi ne povis kredi, ĉar en mi la aŭtoro jam estas historia persono. Poste mi eksciis, ke Baghy forpasis en 1967. En 1965 okazis la 50-a UK en Tokio, kaj tuj poste, dank’ al la influo, mi eklernis Esperanton. Baghy do

ankoraŭ ne apartenas al la historio tiom pasinta. La hungaro rakontis sian travivaĵon.

“Kiam mi estis 15-jara knabo, mi komencis lerni Esperanton ĉe lia hejmo. Li estis ja severa instruisto. Li devigis min parkere memori ĉiun frazon, ĉion, kion mi legis. Eĉ se mi sukcese plenumis la taskon, li neniam min laŭdis.”

Li senĉese parolis trinkante kafon, manĝante sandviĉon. Ankaŭ mi manĝante, trinkante aŭskultis lin.


“Tiutempe esperantistoj kaŝ-aktivis subtere por eviti persekuton. Mi ofte kuris tien kaj reen laŭ la ordonoj de superuloj por komuniki informojn inter esperantistoj, ĉar ili pensis, ke aŭtoritatuloj ne imagas ke knabo laboras kiel informportanto. Nu, mi ŝanĝu la temon. Ĉu vi scias, kiel Julio Baghy vivis en siaj vesperaj jaroj?”

Mi kapneis. Lia parolo daŭris. Laste li menciis, ke Baghy longe suferis pro malsano kaj mortis en 1967, en la aĝo de 76 jaroj.

Post la UK, reveninte hejmen mi ordigis miajn notojn kaj rimarkis, ke rilate al la hungaro, mi havas nenian kontakto-rimedon. Nur lia parolo ĉe la salono klare restas en mia memoro.

JAPANISME POR LA RUSOJ (5)

notita de Anatolo Gonĉarov



Japanio kaj Koreio estas **tiel proksimaj** najbaroj kiel **inter dentoj kaj lipoj** ..

NISIO Tutomu, or., *Riveroj*, 1993,1, p. 25.

Ĉu lingvo Esperanto mem povus havi ian nature elfontantan karakteron aŭ kulturon nur propra al ĝi mem, malsama al aliaj naciaj lingvoj? Jes. Sed kiel? Nur per **stako de niaj klopodoj** en tiu kampo.

NISIO Tutomu, or., *Riveroj*, 1993, 1, p. 28.

Kaj **okazis tiel kaj tiel**, ĝis la infano fariĝis la filino

de la doktoro

Hans Jasik, tr., *Riveroj*, 4, (1994), p. 22.

En la biblioteko mi parolis **balbute ol flue**, ĉar al mi mankas parola praktikado

MINE Yositaka, or., *Riveroj*, 1994, 6, p. 40.

...de 60 jaroj ĝi daŭre **nestis en la cerbo** de mi, 81 jara profundaĝulo...

MITUISI Kiyosi, or., *Riveroj*, 1995,10, p. 9.

Krak', krak', kun krakoj de la getaĵoj li kuris ascende sur la ŝtuparo. Mi lante postsekvis lin kun **strange kristala humoro**. Ekstere, la rivera vento refreŝige blovis miajn vangojn.
UEYAMA Masao, tr., *Riveroj*, 15, (1997), p. 38.

Ĉu Naozi sentis ian respondon pri mia eksedziniĝo? Li diris, mi mortigos min, kaj **ploradis tiel laŭte, kvazaŭ lia vizaĝo putrus**.
UEYAMA Masao, tr., *Riveroj*, 15, (1997), p. 40.

Estas devige, ke la knaboj provu **saltraĵdi** sur la aleofinan akutan deklivon pli ol 2-metrojn altan.
OOTA Yukito, or., *Riveroj*, 16, (1997), p. 35.

Vi estis en la plej alta kaj valora pozicio, kiun neniu povas gajni **eĉ kiel dezirante**
Bam Buo (Hukui), tr., *Riveroj*, 1998, 22, p. 10.

Mi ankoraŭ pacienciĝis, dum mia patro vivis. **Se**

sinjoro ne estas sinjoro, vasalo ne estas vasalo. Sekve imperiestro Wuwang en Zhon-dinastio pereigis tiranon...
Bam Buo (Hukui), tr., *Riveroj*, 22, (nov. 1998), p. 12.

Sinzei, malbenita de la eksmikado **kontraŭstaris** al Huziwara... **deziri** altajn postenojn kaj rangon... [La rusoj e-dirus *dezirante altajn ...* rim. de AG]
Bam Buo (Hukui), tr., *Riveroj*, 22, (nov. 1998), p. 14

En la sekvanta mateno, mi trovis lin dormantan sur la planko. Mi **tenis malfortan kapdoloron** kaj la ankoraŭ daŭrantan koleron. Ĝis nun neniu viro prtitraktis min tiel
Hans Jasik, or., *Riveroj*, 22, (nov. 1998), p. 31.

Per atenta rigardo mi klare legis...sed **la interno restis obskura**. Kion fari, mi denove ŝtoniĝis en starado, sed poste algluis min al la enireja pordo...
UEYAMA Masao, or., *Riveroj*, 22, (nov. 1998), p. 39.
(*daŭrigota*)

BELETRO

Du fratoj (二人の兄弟)

verkis Ŝimazaki Tooson
esperantigis AIDA Kiyoshi

Ĉapitro 1 Fruktoj de celtido

Ĉu vi iam prenis la fruktojn de celtido? Ĉu vi iam iris al la loko sub tiea arbo, kie troviĝas falintaj fruktoj? Ĉu vi iam ludis kolektante kaj manĝante aromajn fruktojn de la arbo?

Estis la sezono, kiam la fruktoj de la celtido falas. Du fratoj atendis la tempon por kolekti la fruktojn de kiam la fruktoj ankoraŭ estis verdaj kaj nemanĝeblaj kaj ili deziris, ke la fruktoj frue maturiĝu.

Estis bonkora kaj honesta maljuna servisto en la domo de la du fratoj. Ĉi tiu avĉjo scipovis fari ĉion ajn; li iris al monto por haki arbojn kaj al kamparo por kulturi legomojn.

Li alparolis la du fratojn. "Nun vi ne povas manĝi la fruktojn, ĉar ili estas nematuraj kaj amaraj. Bonvolu atendi iom da tempo." La pli juna frato estis senpacienca knabo kaj ne povis atendi ĝis la

fruktoj maturiĝos. Li kuris eksteren malgraŭ la deteno de la avĉjo. Kiam li iris tien por kolekti la fruktojn, unu garolo sur la alta branĉo pepis laŭte. "Nematura! Nematura! Estis frue!"-pepadis la birdo.

La senpacienca pli juna frato ĵetadis ŝtonojn kaj bastonojn por faligi fruktojn de la arbo. Ĉiufoje folioj kaj fruktoj kune defalis de la celtido, sed ĉiuj fruktoj ankoraŭ estis nemanĝeblaj, ĉar ili estis nematuraj.

Post iom da tempo la pli aĝa knabo aliris al la arbo. Li estis malrapidema knabo diference de la frato. "Ne hastu ĝis la fruktoj estos maturaj." Dirinte tion li restis tute trankvila. Kaj li malrapide iris tien. Kiam li alproksimiĝis al la arbo por kolekti



la fruktojn, la garolo sur la alta branĉo pepis laŭte. “Tromalfrue! Tromalfrue!”-pepadis la birdo.

La malrapidema pli aĝa frato diligente ĉirkaŭserĉis la fruktojn sub la arbo, sed li ne povis trovi eĉ unu ruĝan frukton. Antaŭ li malrapide iris tien, aliaj knaboj jam prenis ĉion falintan sub la arbo. La du fratoj rakontis al la avĉjo pri ĉi tiu fakto. “Unu iris trofrue, la alia tromalfrue. Se vi ne konas la ĝustatempon, vi ne povas kolekti la bonajn fruktojn de la celtido. Mi instruas al vi la ĝustatempon por kolekti la fruktojn”-diris la avĉjo.

Lun matenon la avĉjo instruis al la du, “Nu, hastu kolekti la fruktojn. Jam venis la ĝustatempo.” En tiu mateno la branĉoj de la celtido forte skuiĝis pro forta vento. Kiam ili hastis tien, la garolo rigardis ilin de sur la alta branĉo kaj pepadis, “Ĝustatempe. Ĝustatempe.”

Sub la arbo troviĝis tie kaj ĉi tie multe da malgrandaj ruĝaj fruktoj falintaj. La du fratoj ĝuis kolekti tiom da fruktoj ĉirkaŭkurante la arbon.

La garolo klinante la kapon vidis ĉion ĉi. “Multe da bonaj fruktoj troviĝas sub la arbo. Kolektu multe da fruktoj. Mi ankaŭ faros al vi unu donacon. Bonvolu kolekti ĝin.” Dirante tion, la birdo faligis unu plumon kun blua makulo de sur la alta branĉo.

La du fratoj kolektis ne nur la fruktojn, sed ankaŭ kolektis la belan plumon de la garolo. Krome ili ekmemoris “Ĝustatempon” sub la celtido kaj reiris hejmen.

Ĉapitro 2 Rakonto pri fiŝhokado

Lun tagon la avĉjo diris al la du fratoj, ke li faros fiŝkaptilojn por ili. La du fratoj pensis, ke fari fiŝkaptilojn estos malfacile eĉ por la avĉjo. Neniu vendejo troviĝas por vendi unu fiŝstangon en la najbaro de la du fratoj.

La avĉjo trovis fiŝhokojn ie. Kaj li trovis maldikan bambuan stangon, el kiu li faris du fiŝkanojn. “Fiŝhokoj kaj stangoj pretiĝis. Sekvas fiŝfadeno”-diris la avĉjo. Li fadenigis la kokonon de insekto nestanta ĉe kaŝtanarbo. Oni povas ŝpini blankan fadenon el la kokono de la insekto ĝuste kiel el silkraŭpo. La avĉjo mergis la fadenon en vinagron kaj longe etendis ĝin. Post sekiĝo en sunvarmo la fadeno fariĝis

tiel forta, ke la du fratoj ne povis rompi ĝin perforte. “Nu, la fiŝkaptiloj estas pretaj.” La avĉjo donis ilin al la du fratoj.

La du fratoj ĝoje iris al rivereto kunportante la fiŝkaptilojn, kiujn la avĉjo faris. Apud la rivereto troviĝas loko, kie staris nuksarbo. Ili elektis la lokon, kie ĉotfiŝoj restas inter ŝtonoj kaj hokis ilin sidante en la ombro de la nuksarbo.

Duontage ili ludis ĉe la riverbordo kaj reiris hejmen. Dume la avĉjo ĝuste revenis hejmen portante brullignojn surŝultre.

La avĉjo demandis ilin, “Ĉu vi kaptis fiŝon?” La du fratoj kapneis malkuraĝe. Neniu saĝa ĉotfiŝo estis kaptita sur la hokoj de la du fratoj.

Tiam la du fratoj rakontis pri la fiŝkaptado. Ĉar la pli aĝa frato malrapide fiŝkaptis, la logaĵoj metitaj al fiŝhoko estis tute manĝitaj de ĉotfiŝoj.



La pli juna frato ne povis atendi ĝis fiŝo estos kaptita, ĉar li estis malpacienca. Kiam li kirlis la akvon, ĉotfiŝoj surprizite kaŝiĝis sub la ŝtonojn.

Aŭdinte la rakonton de la knaboj la avĉjo ridetis en honesta kaj bonkora voĉo. Kaj li diris al la du fratoj, “Unu estis pacienca kaj la alia estis malpacienca. Oni ne povas fiŝkapti nur per fiŝkaptilo.”

(fino)

Pri la aŭtoro Ŝimazaki Tooson

Ŝimazaki Tooson (1872-1943, 島崎藤村), naskiĝinta en la urbo Nakacugaŭa, la gubernio Gifu, diplomiĝis el Meiji Gakuen Universitato. Li komencis versi “Ŭakanaŝjuu (kolekto de poemoj) kaj poste li verkis novelojn. Li verkis famajn novelojn, t.e. “Hakai (leĝrompo)”, “Haru (printempo)”, Ŝinsei (nova vivo), “Joakemae (antaŭ tagiĝo)”, kaj “Tohoo no mon (pordo al oriento)”.